Bertolt Brecht,

La tajloro de Ulm

tradukita de Hans-Georg Kaiser

"Episkop', mi flugos",
diris tajloro al Moŝt'.
"Venu, por moment'."
Kaj li grimpis kun flugiloj
en aplaŭdo kaj jubiloj,
ĝis la granda granda kirktegment'.
Lia Moŝt' nur diris:
"Mensogoj, kiel ĉiam.
Hom' birdo ne estas.
Homoj flugos neniam."
La episkopo plu iris.

"La tajloro jam ne vivas",
diris la homoj ĉe l' Moŝt':
"Trois la aŭdac'.
La flugiloj frakasiĝis,
la tajloro surnaziĝis
sur la dura dura kirkoplac'."
Sonoriloj sonis.
"Mensogoj, kiel ĉiam!
Hom' birdo ne estas.
Homoj flugos neniam",
la episkopo admonis.

Traduko de la Germana poemo "Der Schneider von Ulm" de Bertolt Brecht *(∗1898 – †1956) en Esperanton de* Hans-Georg Kaiser *(Cezar, ∗1954-05-21).*

Arg-1084-2183 (2014-08-06 13:31:54)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en `http://cezartradukoj.blogspot.de/`.